WIKIPEDIA

Nordaj kurdaj dialektoj

La **nordaj kurdaj dialektoj** aŭ **kurmanĝia**, variaĵoj de la kurda lingvo, estas parolataj en Turkio fare de proksimume 15 milionoj da parolantoj, kaj krome de eble 5 milionoj da homoj alie (2,8 milionoj en Irako laŭ nombroj de 2004, 940000 en Sirio laŭ nombroj de 1993, 350000 en Irano laŭ nombroj de 1998. Nacilingve ĝi nomatas *kurdiya jorîn*, en araba skribo کوردیا ژۆرین, aŭ ***kurmancî*** [kurMANĝi], en araba skribo کورمانجی. Ĝia ISO-kodo estas `krm`. Sume proksimume 80 procentaĵoj de la parolantoj de la kurda lingvo apartenas al tiu dialektaro. Ĝi estas la oficiala ceremonia lingvo de la jezidismo, kaj en tiu funkcio havas statuson de oficiala malplimulta lingvo en Armenio. Kvankam historie la kurda foje ankaŭ skribiĝis per la araba aŭ cirila skriboj, nuntempe normas specifa variaĵo de la latina skribo.

Kadre de la kurda lingvo la nordaj dialektoj kontrastas precipe al la centraj kurdaj dialektoj, sume nomataj sorana lingvo, kaj al la sudaj kurdaj dialektoj, kaj en la irana lingvaro diferenciĝas ankaŭ de la proksimaj gorana lingvo kaj zazaa lingvo.

Vidu ankaŭ

Kurda lingvo

Sorana lingvo

Nordaj kurdaj dialektoj

kurdiya jorîn

Kurdaj dialektoj: Areoj kie la nordaj dialektoj parolatas aperas helruĝe.

Parolata en	Irano, Irako, Sirio, Turkio
Parolantoj	15 000 000
Denaskaj parolantoj	proksimume 15 milionoj en Turkio, eble 5 milionoj alie (2,8 milionoj en Irako laŭ nombroj de 2004, 940000 en Sirio laŭ nombroj de 1993, 350000 en Irano laŭ nombroj de 1998)
Skribo	latina alfabeto, araba alfabeto, cirila alfabeto

Lingvistika klasifiko

Hindeŭropa lingvaro
Hindirana lingvaro
Irana lingvaro
Okcidenta
Nordokcidenta
Kurda lingvo
Norda Kurda

Oficiala statuso

Oficiala lingvo en	rekonita malplimulta lingvo en Armenio

Lingvaj kodoj

Lingvaj kodoj	
ISO 639-2	kmr
ISO 639-3	kmr
SIL	kmr
Glottolog	nort2641

Angla nomo	Kurmanji
Franca nomo	kurmandji

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Nordaj_kurdaj_dialektoj&oldid=6922751"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 16:29, 24 mar. 2020.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.